# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 51  Aŭgusto 31, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo:  Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390  KB. Alk: Rezolucio: 258, Sume: 680 KB**

**Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.**

## Renkontiĝoj en Germanio




Jen informoj pri JES, Luminesk' Jubilea Kulturo kaj Bibliaj Tagoj.

La bildo prenita el 'Fenikso', la revuo de la Nederlanda Movado

## Literatura kurso en Serbio

Jen la **afiŝo** de la Literatura kurso de Zlatoje MARTINOV. **Aliĝi eblas pere de reta aliĝilo per la sekva ligilo: https://forms.gle/Ltjk5Vn7rTEAGVky9**
**aŭ per simpla retmesaĝo** al la retadresoj: laslo.az@gmail.com (Aranka Laslo), zlatoje@yahoo.com (Zlatoje Martinov).

Ekde la aŭtuno okazos kultura kurso por esperantistoj loĝantaj en balkanaj landoj. Gvidos ĝin Zlatoje Martinov en Esperanto. Ĝi konsistos al 12 prelegoj ( po unu horo) ekde la unua lundo de novembro 2023. Ĝi okazos ĉiun duan lundon (dufoje monate) per la programo Zoom kun komenco je la 19:00 horo [en Beogrado = UTC+ 1] kaj daŭros ĝis la mezo de aprilo 2024. La kurso estas senpaga por la partoprenantoj. Bonvolu aliĝi per mesaĝo al Zlatoje Martinov <zlatoje@yahoo.com>

## Serbiaj esperantistoj kunvenis tutlande

La 19-an de aŭgusto 2023 en Jagodina okazis ĉeesta, amika, duontaga renkontiĝo de serbiaj esperantistoj. Ĝi estis la unua tiutipa renkontiĝo ekde la refondiĝo de Serbia E-Ligo (SEL). Ĝin partoprenis 18 esperantistoj de la nordo ĝis la sudo de Serbio (el Beograd, Čačak, Jagodina, Kragujevac, Niš, Subotica, Zemun kaj Zrenjanin). **La programo** estis bunta: vizito de la Muzeo de naiva arto en Jagodina, paroladoj de Jovan Zarković (prezidanto de SEL) kaj Radojica Petrović, interkonatiĝo de partoprenantoj, komuna tagmanĝo, estrarkunsido de SEL, vizito al la vinkelo Jovac (vingustumado, kantado kun gitaro (Saša), amika vespero kun kantoj kaj gitarludo (Saša kaj Nedeljka). La loka TV-stacio intervjuis kvar partoprenantojn (Jovan Zarković, Radojica Petrović, Saša Pilipović kaj Nedeljka Ložajić). Jen la preskaŭ **6-minuta, serblingva raportaĵo de Televizija Pomoravlje:** https://youtu.be/SOpzmZVXEb4

**Dankegon al la geedza paro Radosav kaj Lila Janković**, kiu iniciatis kaj gastigis la eventon, **kaj ankaŭ al la ĉeforganizanto** de la renkontiĝo, **Bojan Veličković**.

Ambaŭ eroj de Aranka Laslo, ILEI-Serbio

## Informilo por Interlingvistoj (IPI)

La numero konsistas el kvin sekcioj: Eventoj, Universitata kaj Esplora Agado, Kulturo, Personoj, kaj Bibliografiaĵoj. La teamo reenkondukis la bonan kutimon de Detlev Blanke, dediĉi apartan atenton al elstaraj interlingvistoj okaze de signifaj jubileoj. Ĉi-numere temas pri Ilona Koutny, kiu festis sian 70-jariĝon en 2023 kaj antaŭnelonge atingis ankaŭ 25 jarojn de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano.

La nova, duobla numero 123-124 estas elŝutebla ĉe la retejo de CED: https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2023/07/IpI_123.pdf. Arkivo de antaŭaj numeroj estas trovebla ĉe https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo/.

Komentojn kaj kontribuojn por la venonta numero sendu al: ipi@interlingvistiko.net.

Mark Fettes, Direktoro, Centro de Esploro kaj Dokumentado, UEA

## Leg-invito el Japanio

Sumoo estas internacia legprojekto de Esperanto-libroj. Nuntempe averaĝe 300 homoj el 35 landoj legas Esperanto-librojn ses fojojn jare po 15 tagoj. Vi simple sendu vian datumon pri vi kaj pri via legado, kaj komencu legi ekde la 10-a de septembro.
La septembra, 83-a Sumoo komenciĝos la 10-an de septembro por 15 tagoj ĝis la 24-a. Mi atendas vian aliĝon. Nia retejo: http://www.esperanto-sumoo.pl/

HORI Jasuo, hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

## Abrakadabra – la danco

Danco makabra – Nicolino Rossi. Jen la unua premio en la branĉo “Poezio” de la Belartaj Konkursoj de UEA:
[https://youtu.be/L-dXFlzUAIA](https://youtu.be/L-dXFlzUAIA) mga

## Albana junularo aktivas, lanĉis kurson




Jen la afiŝo por tiu reta kurso. Multo okazas en la balkana regiono! Albanio en 2023 havas 9 membrojn de UEA, el kiuj 8 estas membroj pere de Fondaĵo Canuto.

Tuj post la Universala Kongreso en Torino, oni sendis la kongresan rezolucion al la direktoro de la fako pri neregistaraj organizoj ĉe UN – en Esperanto kaj la angla.

## La Torina rezolucio nun akirebla en dek unu lingvoj

Depost tiam, mi povis aldoni tradukojn en tri pliaj lingvoj el la ses oficialaj lingvoj de UN, nome la franca, la hispana kaj la ĉina.  Koran dankon al tiuj kiuj faris la tradukojn.

Pliaj tradukoj troviĝas ĉe [https://uea.org/vikio/Rezolucio_UK_Torino_2023](https://uea.org/vikio/Rezolucio_UK_Torino_2023).

La pliaj lingvoj estas la albana, angla, ĉina, germana, hispana, hungara, itala kaj la nederlanda.  Ni alkroĉas la rezolucion en la nove aldonitaj lingvoj.

## La origino de la projekto 30 Oraj Horoj

En la somero de 2021, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Itala Instituto de Esperanto kune lanĉis novan instru-projekton en la regiono Toskanio de centra Italio. La ideo de Bruĉjo Kasini kaj Laura Brazzabeni estis, ke Esperanto estas ja facile lernebla lingvo, kaj tial ĝi povas helpi gelernantojn pli bone kompreni la strukturon de aliaj lingvoj kaj ankaŭ de la propra. Sed ne sufiĉe da instruistoj en italaj superaj mezlernejoj regas Esperanton.

La solvo – ebla por Esperanto, sed apenaŭ farebla por aliaj lingvoj – estas instrui unue al la instruistoj per senpaga video-kurso. La kurso daŭras 20 horojn plus 10 horojn da individua studado kaj specialaj interretaj renkontiĝoj kun spertaj instruistoj. Tiel naskiĝis la nomo de la projekto: “30 Oraj Horoj”.

Dum tiuj tridek horoj oni lernas multe, ne nur pri la lingvo mem, sed ankaŭ pri ĝiaj historio, kulturo kaj movado, per la helpo de fakuloj kiel Renato Corsetti kaj de la Nacia Biblioteko de Esperanto en la itala urbo Massa.

Necesis la subteno de la lokaj instancoj por proponi la kurson al ĉiuj lernejoj de Toskanio kaj la regiono Friulo-Venecio, kie estis okazinta la kongreso de ILEI. Tial Bruĉjo Kasini en 2021 petis min verki dokumenton pri la historio de la eksperimentoj, kiuj pruvas, ke Esperanto estas facile lernebla kaj helpas en la studo de aliaj lingvoj. Tiel naskiĝis la unua malneto de mia libro ‘Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj’. Fine, ĝi estis eldonita kiel 300-paĝa libro.
En 2023 Itala Instituto de Esperanto, ĝuste pro la Projekto “30 Oraj Horoj”, gajnis eŭropan premion pri lingvo-instruado, en konkurso lanĉita de du italaj instancoj, kiuj

okupiĝas pri edukado. En julio 2023 Edistudio eldonis mian libron ankaŭ en Esperanta traduko. Espereble aperos pliaj tradukoj en malsamaj lingvoj. Tiel nia instrua sperto utilos ne nur en Italio, sed povos esti adaptita al diversaj situacioj tra la mondo.

Alessandra Madella

La libro estas mendebla ĉe la eldonejo Edistudio en Esperanto kaj la itala.

## Kurso por seriozuloj

Unu el la plej ŝatataj kursoj de la reta kursaro de ILEI, EToSo, estas la kurso por azianoj je la nivelo C1 gvidata de Trevor Steele. Oni devas paroli Esperanton flue kaj oni skribas, diskutas kaj legas diversajn tekstojn, i.a. romanojn de Trevor mem. La kurso okazas per la vid-programo Zoom ĉiusabate de la 07:45 ĝis la 09:00 UTC. Temas pri horo taŭga por azianoj, sed ĉiuj rajtas aliĝi, se oni povas adaptiĝi al la horo. Por aliĝi al la senpaga kurso, sendu mesaĝon al la prezidanto de ILEI, mamduhi@gmail.com, kaj/aŭ al renato.corsetti@gmail.com, sed nur se vi volas serioze partopreni.

## Eŭropa komisiono de UEA instigata al pli forta agado

Mesaĝo al la reprezentantoj de landaj asocioj ĉe la Eŭropa komisiono: laŭ la eŭropa komisiono via tasko estas ĉiam pli grava, ĉar la eŭropa komisiono povas fari ion nur pere de viaj landaj asocioj. Ni komencos paroli pri la agad-plano por la nova labor-jaro.

## Nova retlisto por eŭropaj aktivuloj

Bonvolu noti, ke ekde septembro la listo por tiuj, kiuj interesiĝas pri agado en eŭropo estos: <europaj-aktivuloj-por-esperanto@groups.io>, bonvolu aliĝi al ĝi per simpla mesaĝo al <europaj aktivuloj-por-esperanto+subscribe@groups.io>.

Ambaŭ Renato Corsetti

## Instrui Esperanton al pliaĝuloj

Jen plia trezoro el la Kongreso de ILEI.

56-a ILEI-Kongreso: Instrui Esperanton al pliaĝuloj (Malgosia Komarnicka) - ILEI Simpozio 2023

## Unu lasta klopodo de Poznano

Ekde septembro la eblo sekvi la studojn en la okcident-pola urbo.

Interlingvistikaj Studoj en Poznano: dujaraj magistraj studoj

============== vortoj: 1195 =============

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 42).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.